

AGORDINNE



HISPANA ESPERANTISTA
JUNULARA SOCIETO

ATOCHA, 98-4.
TEL. (91) 230 87 98
28012 MADRID
HISPANIO

decembro
1984

N-RO
122

SUPEROTAJ

SEN SCIENCFIKCIO KAJ FANTASTO



Kaj en la Serio pri E-lingva kompe-
tento, Zamenhof mem priskribas siajn
SUPEROTAJN:

«Mi vojaĝas en Hispanujo;
mi vojaĝas en Hispanujon»

G.K.

Enhavo

- Paĝo 1 Suferoj-1
" 2 Ĉu vi vere ne divenas?
" 3 Leteroj al la Dir. Letero al la Leg.
" 4 Informoj
" 5 La Falsa Mesio
" 7 Lul-kantoj de la cepo
" 8 Pensoj de filozofo
" 9 Loteria sciigo
" 10 La Intervjuo de l' Primato
" 11 Distraj paĝoj
" 14 Ne nepre absolute kaj tute kleriga klarigo pri
evidentaj k/aŭ evitendaj eraroj, misaĵoj ktp...
" 18 Pri ĵusa kongreso
" 20 Fotoj faritaj de E-spiritistoj
Ĉie dise Distraĵoj, stultaĵoj k/aŭ farĉaĵoj (Trovu mem!)

KUNLABORIS George Kamaĉo, Rikardo F.A.R., Francisko Ksavero Moleono, A.M.Ranero, Anonimulo, Mikeloj H- kaj Fernández, Miguel Ángel Sancho, Zgeorgo Zkamaĉo, ゲオルゴ・カマチヨ, Alberto Franco Ramírez, anonima fotinto, Medi U.M.

Pri la enhavo de siaj artikoloj responsas ĉiu aŭtoro. La redaktoroj pretas lingve korekti la prozajn kunlaboraĵojn, sed ne la versajn, por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon. Pri la aŭtoreco de senaŭtoraj kunlaboroj la redaktoroj respondos laŭeble.

REDAKTIS la Triopo (la nomojn vi trovos sub "KUNLABORIS"; la tri unuaj).

Kopirajto: HEJS-JUNECO, gazeto de Hispana Esperantista Junulara Societo, hispana sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj junulara sekcio de HEF (Hispana Esperanto-Federacio).

LETEROJ AL LA **DIR.:** JEN EL **germana** **esperanto-junularo**

Loka Kongresa Komitato
Postfach 10 14 22
D-2000 Hamburg 1

Tel. 040 / 250 30 65



Karaj geamikoj !

U.K.



41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
SCHLOSS ERINGERFELD

22-29.7.1985 F.R. GERMANIO

Kore salutas vin

(Gerald Roemer - Kasisto)

LETERO AL LA **LEG*:**

Karaj geleg.:

Pro diversaj kaŭzoj, kun larmoj el la okuloj, ni devas bedaŭrinde adiaŭi niajn karajn leg-ojn, kiuj tiel varme kaj kortuŝe nin kuraĝigis en nia laboro. Jen do vi legas nian lastan numeron, kaj la venontan vi ricevos de nova bakisto. Fartu bone kaj ne ploru pro ni.

Viaj karaj redaktoroj

* "LEGANTO" AŬ "LEGOMO", LAŬPLAĜE.

HEJS INICIATAS ESPLORAGADON.

La junulara Sekcio deziras instigi novajn talentojn kuniĝi por esplorlaboroj humanecaj, sciencaj aŭ teknikaj. Por tio ĝi klopodos, eventuale kun la helpo de aliaj institucioj, starigi laborgrupojn. La celo estas, ke esperantista junularo eduku sin per persista laborado en Esperanto celanta iun ajn studobjekton.

Nia espero estas la nivelaltigo de nia Esperanto-kono per utila tasko, kiu samtempe donos kulturalan scion. Por ĉio ĉi ni petegas reagojn kaj eventualajn helpopropojn. Adresu ĉiun sugeston al nia sidejo.

Pli konkreta propono: interesitoj pri (mikro-)komputiko kaj interlingvistiko, dezirantaj pri-trakti ion esperantan, tuj sciigu pri si al Miguel A. Sancho, momente provizora kunordiganto (Marcelo Usera 163, 28026 Madrid).

Ne timu, se vi ne estas specialisto, aŭ ne bone regas la lingvon. Ci iniciato celas gustetion..., ke vi farigu bona Esperanto-parolanto, kaj kresku en vi, kadre de ideo-interŝanĝo de neofitoj, scio pri la fako, kiu vin interesas. ●

GRAVA INFORMO DULINIA (sed ne dulingva, oĝjo)...

(LA UNUAN KAJ DUAN DE DECEMBRO OKAZ-IS, -AS Aŭ -OS)

(LA SOLENE FAMILIARA ĜIJARA HEJS-KUNVENO!!!!!!!)



BOLETIN

light

50-procente erara

4

Ⓚ George Kamezo kun spirita apogo de F. K. Mokono kaj sen apogo de aliaj (ne multaj), kiuj ne ŝatas polemikojn, bedarrinde...

Antaŭ longe loĝis en Worms judo, kiu havis belan filinon. Juna pastro, kiu ne loĝis fore, enamigis al ŝi, ŝi respondis al lia amo kaj gravedigis. Iliaj domoj estis tre proksimaj; li povis ofte alproksimigi al ŝi kaj paroli laŭvole kun la knabino. Kiam ŝi rimarkis, ke ŝi estas graveda, ŝi diris al la junulo:

-Mi naskos infanon. Kion mi faru? Se mia patro tion scios, li mortigos min.

-Ne timu -li respondis-, mi helpos vin. Se via patro aŭ patrino diras al vi: "Kio okazas, nia filino? Via ventro ŝveliĝas; ŝajnas, ke vi estas graveda", vi respondu: "Mi nenion scias pri tio; mi scias, ke mi estas virga, kaj ke mi nenian rilator havis kun viro". Mi kredas, ke mi konvinkos ilin, por ke ili kredu vin.

Poste ili meditis, kiel helpi la junulinon, kaj elpensis ŝi tiun trompon. Iun trankvilan nokton li alproksimigis kanon al la fenestro de la ĉambro, kie la gepatroj de ŝia amatino dormis, kaj li parolis tra la kano tiel:

-Goju, justuloj, preferataj de Dio! Via virga filino gravedigis je filo, kiu estos la Savanto de via Israela popolo!

Poste li iom deflankigis la kanon. La judo, kiu tuj vekigis, vekis ankaŭ sian edzinon kaj eksklamacis:

-Ĉu vi ne aŭdis tion, kion la ĉiela voĉo ĵus diris al ni?

-La virino neis, kaj li diris:

-Ni preĝu, por ke Dio honoru ankaŭ vin per tiu voĉo.

Dum ili preĝis, la pastro staris apud la fenestro kaj atente aŭskultis ĉion. Post nelonge li ripetis siajn antaŭajn vortojn kaj aldonis:

-Vi devas multe honori vian filinon kaj zorgeme trakti ŝin, kaj devote prizorgu la infaneton, kiun ŝi havos, ĉar li estos la tiel multe atendata Mesi

La judoj estis tute ĝojaj, nun certaj pri la dufoje aŭdita revelacio, kaj ili preskaŭ ne povis atendi ĝis la tagiĝo. Matene ili rigardadis sian



filinon, kies ventro menciis iom rondiĝi, ili demandis al ŝi: -Diru al ni, nia filino, de kiu vi graciis.

Ŝi respondis kaŭ instruicioj. La gepatoj eksaltis de feliĉo kaj ili ne povis kaŝi al familianoj tion, kion angelo komunikis al ili. Ĉi tiuj rakontis tion

aliaj, kaj tiel en la tuta urbo estis rapide konata la novaĵo, ke la virgulino naskos la Mesion. Kiam alproksimiĝis la momento por akusi, multaj judoj venis al la domo, dezirante ricevi gracon de la tute longe atendata Savanto.

Sed la justa Dio decidis doni al ili surprizon. Alvenis la malfacila horo por la junulino, kaj kuŝiĝis doloroj, sopiroj kaj krioj. Kaj, kio okazis? Ŝi naskis bebon; ne la Mesion, sed etan filinon.



LUL-KANTOJ de la CEPO

La cepo estas prujno
fermita, povra.
Prujno por vi ja taga
kaj por mi nokta.
Malsat' kaj cepo,
nigra glaci' kaj ega
ronda prujnero.

En lulil' el malsato
mia fil' kuŝis.
Cep-sangon mia ido
ade mam-suĉis.
Sed via sango
estas prujn' el sukero,
cep' kaj malsato.

En lunon transiĝinte,
bruna virino
fluete disverŝigas
ĉe la lulilo.
Ridu, infano,
ke vi glutas la lunon
laŭ via plaĉo.

Alaŭdo miadoma,
ridu vi multe.
Via rid' surokula
brilas mondlume.
Tiom ridadu,
ke l' anim', vin aŭdante,
la spacon frapu.

Via rid' liberigas,
flugilojn kreas.
De mi ŝiras karceron,
solecojn prenas.
Buŝo fluganta,
ĉe la lipoj la koro
via fulmadas .

Ja pleje spado venka,
jen via rido.
De floroj kaj alaŭdoj
vi — la venkinto.
De l' sun' rival'.
Estont' de miaj ostoj
kaj mia am'.

La karno flugilmova,
palpebroj viglaj,
la vivo kolorplena
kiel neniam.
Ho, flugilmovo!
Kardel-amas' sor flugas
el via korpo.

El knabec' mi vekigis:
vi ne vekigu.
Tristadas mia buŝo:
vi ĉiam ridu.
Sur la littuko,
defendante la ridon,
plumon post plumo.

Estuĵ' alt- kaj vastfluga,
la karno via
estas vere ĉielo
ĵuse naskita.
Ho, kia ĝuo,
se mi sorus al eko
de via flugo!

Kun kvin oranĝofloroj,
beb' okmonata,
kun kvin' da ferocajoj
etaĵ, ridadas.
Kun kvin' da dentoj
kiel adoleskantaj
kvin' da jasmenoj.

Kis-limo estos ili
en la morgaño,
kiam ĉe la dentaro
vi sentos armon.
Fajron vi sentos,
de la dentaro sob kuri,
serĉante l' centron.

Dormu ĉe l' brusta luno
duopa, kara:
ĝi — trista de la oepo,
vi — gaje sata.
Ne ruinigu,
pri la okazantaĵoj
vi ne konsciu.



ETA PAŜO POR
MIKEL-ANGELO,
GRANDA PAŜO
POR H.E.J.S.



24 122!

99 AL AĈET' KUN GAJET'!²

Bv. aĉeti vi mem aŭ instigi aliajn
tion fari! Tuj! tuj!

Ĉiu bileto kostas 100 (cent)
pesetojn, el kiuj oni vetas **OKDEK**
(80)!

Sendu vian peton (t.e.: mendu)
al HEJS, Atocha 98 40, 28012 MADRID,
kaj aldonu al la pago 50 (kvindek)
pesetojn por "registrite-sendokosto."

Vi gajnos 800.000 pesetojn!

(En E-o tiu punkto ne necesas!)

LA INTERVJUO DE

© G. KAMAĈO



● Intervjuas...




... Hejsĉjo!!!

HOMO ENUIGUS FANTOMUS

Homo Komencantus
Homo Georgus Komasklus
Homo Homini Lupus


HOMO
LAMBACIZUS



LA INTERVJUO DE L' PRIMATO

© G. KAMAĈO

(EKSTRAKTO EL "SUFEROJ-1"!!!)




● Intervjuas...



... Hejsĉjo!!!

HOMO ENUIGUS
FANTOMUS

Homo Komencantus
Homo Georgus Komasklus
Homo Homini Lupus



HEJSĈJO: Kiam vi lernis Esperanton?
 HOMO ENUIGUS FANTOMUS: Kiam mi lernis kion???
 HEJSĈJO: Ne gravas. Kiel vi ĉasas elefantojn?
 H.E.F.: Hm... la pernaza metodo! Ni kaptas ilin je la nazo por sufoki ilin, sed...
 HEJSĈJO: Sed vi ne povas ĉasi elefantojn, sed mamutojn! Mi trompis vin...
 H.E.F.: Vi, ho vi, junuloj...
 HEJSĈJO: Ni ĵus pruvis la kretenecon de ĉi tia prahomo per scienca testo. Karaj legantoj, evitu ilin!

PRIMATO

EKSTRAKTO EL "SUFEROJ-1"!!!)

HEJŜĈJO: Kiam vi lernis Esperanton?

HOMO ENUIGUS FANTOMUS: Kiam mi lernis kion???


HEJŜĈJO: Ne gravas. Kiel vi ĉasas elefantojn?

H.E.F.: Hm... la pernaza metodo! Ni kaptas ilin je la nazo por sufoki ilin, sed...

HEJŜĈJO: Sed vi ne povas ĉasi elefantojn, sed mamutojn! Mi trompis vin...

H.E.F.: Vi, ho vi, junuloj...

HEJŜĈJO: Ni ĵus pruvis la kretenecon de ĉi tia prahomo per scienca testo. Karaj legantoj, evitu ilin!



ZOOLOGIOLOKAZIZ
 VAZOFRENEZAZILO
 EA EZ OFAGOUZIPZO
 LAKTRRZOSTERORF
 EKZEGEZOKOMUKEI
 FAOZAZZUMIAZUKT
 AMTONIIL OZTAZIO
 NIZIGZAGO OZOMA
 TZKEZREZULTATOZ
 IOABILUZIOMEZO
 ALARORLMPUEOT
 ZONONNAHAOPAZENO
 OSMOZO EKLEZIOO
 FHIPO TENUZOP OZI
 NAZOZEPELINO



ĈI TIU ZO-SUPO ESTAS:

AMUZA LUDO, ESENCE KIEL ALIU
 AJN LITERSUPO, SED KIE ĈIUJ VORTOJ
 HAVAS LA LITERON **Z**, KIE ĈIUJ LITEROJ
 APARTENAS AL ALMENAŬ UNU VORTO, ESCEPTE de
 LA DIKAS, KIUJ FORMAS NOMON KAJ NENION PLU.
 VI DEVAS TROVI ALMENAŬ KVARDEK NAŬ

VORTOJN; ĈIUJ ESTAS LAŬ LA DIREKTOJ
 → ↓, SED NENIAM ← ↑ ↘ ↙ ↗ ↖. ĈIUJ
 VORTOJ APERAS EN LA FORMO DE P.V.;
 EKZEMPLE: UZI, kaj ne "uzado", ...

ENTUTE 36 ZOJ!!! (ZAŬTORO: ZG. ZK.)

ĈI TIU LUDO ESTAS
 DANGERA; ĜI PRODUKTAS
 ZO-FOBION.

IRIEIBUISO

8AΠM

NI FORIRIS EL LA ĜANGALO
 ĈASINTE...

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
A	S	L	E	J	E	R		T	U	J
B	T	A	M	E	N		M	A	J	A
C	A	Z	O	R	O	P		G	E	N
Z	L	U		E	T	E	T	A		U
D	D	R	O	P	E	L		S	I	A
E		A	M	O	R	I		P	E	R
F	K	O	O				N	E	N	
G	G	I	L		V		L	I	K	O
Ĝ	A	K	S	A	V		A	T	A	K
H	L	K	K		J	A	G	A	R	A

ĈEFARTIKOLO

Reidanes valik lūvipobs nulayeli lābik ä
 benūkoli. Häys-Yünākso, lāgū yin! Dūnobsös
 obs valik in vob kobik diņi Volapūkatikoda!

SOLV" KIRUC
 a|| (a) VORT
 IE IN || (IM)"

PARDONU NIN, PRO KE Ĉ2 APERIS NIGRA, KAJ Ĉ3 BLAN
 A, SED DANKU", " " LA SOLVO DE E9 POVAS
 ESTI AŬ "E" AŬ "O".

Ne nepre absolute kaj tute
kleriga klarigo pri evidentaj
k/aŭ evitendaj eraroj, misaĵoj
ktp...

AGENTEJOJ. Madrido.

VERKIS 『オルゴ』 カマコ



1.- TINĈJO!

En la traduko far Hervé Gonin de "La krabo kun oraj pinĉiloj" sur la lasta paĝo klare legiĝas "A Miluo" vic' al "Al Miluo". Kies eraro? Tradukista? Presista? Nescieble...

a miluo,
↑

2.- LIMERIKO!

Traleĝante "El boletín de la Federasjón" mi trovis (julio-aŭgusto 1981) tri limerikojn premiitajn en la "Unua Printempa Belarta Konkurso". Jen unu el ili:

Virino kaj viro angore,
li lerte kaj ŝi amatore,
dum kartojn vetludis
jen ambaŭ sin nudis, ←
ĉar veton ŝi pagos... amore.

Certe tre sprita, sed vere surprizas min, ke tiun "sin nudis" anstataŭ "sin nudigis" aŭ "nudiĝis" ne rimarkis la aŭtoro mem (vera tipo de E-kompetentulo) nek la konkursojuĝantoj nek eĉ la supozeble lingve taŭgaj redaktoroj de E-bulteno. Mi proponas alternativan limerikon (la aŭtoro bv. pardonu min):

Virino kaj viro angore,
li lerte kaj ŝi amatore,
post veto kartluda
fariĝis par' nuda,
ĉar veton ŝi pagos... amore.

La aŭtoro re pardonu, ke mi agis... senkomplete.
gloro estu kun tiu, kiu ne mortas.

3.- FUSAĴO!

Ne povas temi pri eraro de l' presisto. Kial en numero de julio-aŭgusto 1984 de tiu "Boletín", t. alineo, aperas ĉi tio: "J. Camaĉo"??? Aŭ J. Camaĉo aŭ prefere G. Kamaĉo! Mi eĉ proponus al vi: Xurxo Kamatxo. Aŭ eble Kamatscho, diable!

4.- ĈU PLAGIATO?!

Ne, ne temas pri "Boletín" kaj Sisterona gazet. Unue legu kaj ĝuu ĉi tiun sciencfikcian rakonton de Fredric Brown (Frederiko Braŭno), laŭ traduko far de la hispanlingva traduko de la anglalingva origino, simile al Vilĉjo Oldo kaj "La Robaĵoj":

RESPONDO

Dŭar Ev formale orlulis la lastan kontaktilon. servis lin dekduo da kameraoj, kaj la subetero tiam sendis dis tra la kosmo dekduon da bildoj pri l' universo.

Li rektiĝis kaj gestis al Dŭar Rejn por tuj prezenti al ŝi al ŝaltilo fermanta la cirkvitojn. Ĝi tuje efektive taktigus la montran komputaron kaj la naŭdek ses miliardojn da loĝataj planedoj de l' universo per la supercirkvito konektanta ĉi ĉion kaj superkomputaron -cibernetika maŝino kombinanta ĉiujn sciojn en ĉiuj galaksioj.

Dŭar Rejn breve alparolis la miliardojn da tele-

-spekt- kaj -aŭskult-antoj. Post paŭzeto li diris:

-Nun, Dŭar Ev.

Dŭar Ev ekŝaltis. Aŭdiĝis la impona zumado de l' cunamo energia venanta el naŭdek ses miliardoj da plandoj. La lumoj intermite brilis dise sur la multajn kilometrojn longaj paneloj.

Dŭar Ev faris unu paŝon retro kaj elspiris.

-Vi havas la honoron demandi la unua, Dŭar Rejn.

-Dankon -li diris-. Mi faros demandon, kiun ĝis nun neniam cibernetika maŝino povis respondi per si mem.

Li turnis sin al la maŝino.

- Ĉu Dio ekzistas?

La impona voĉo senhezite respondis, sen eĉ brueto ĉe unu el la relajsoj.

-Jes, Dio nun ekzistas.

La vizaĝo de Dŭar Ev montris subitan timon. Li ekŝaltis al la ŝaltilo.

Fulmo el la lazuro likvidis lin kaj estigis kurtan cirkviton, kiu senutiligis la ŝaltilon. ■

FINO

Ĉu ĝi plaĉis al vi? Frederiko Braŭno aperigis sian rakonton "Respondo" ("Answer") en la revuo (aŭ eble libro) "Angels and Spaceships" ("Anĝeloj kaj spacoŝipoj") en 1954.

Nu, legu nun ekstrakton el la originale verkita en Ĉ-o leginda novelo de Sándor Szathmári "Maŝinmondo" (la citato venas el du komencaj kaj sinsekvaj paĝoj el naŭdekpaĝa novelo; ĝi do estu ankaŭ instigo kaj invito legi la tuton kaj, laŭ la vortoj de V. Oldo, ĝi "la akran intelekton kaj pikeman spriton de la aŭtoro".):

(...) ... kaj la ministroprezidanto daŭrigis la

paroladon:

-Ĉi tiu maŝino, karaj kuncivitanoj, depost tiu ĉi momento pensadas pri la problemo: kion kaj kiel fari por la intereso de la loĝantaro de Bravio. (...). Ni jam ne plu devas rompi nian kapon, kion fari por la utilo de Bravio. Tiu ĉi maŝino pensadas anstataŭ ni. La maŝino estas senpere kuplita kun ĉiuj niaj esplorplan- kaj produktmaŝinoj. (...). Ĉi tiu estas do la gvidmaŝino, kiu disponos ne nur pri la produktado, sed en ĉiu fako de la vivo. (...). La gvidmaŝino (...) fiksos ĉiam al ni detale, kion ni devas fari (...). La direktadon kaj agon faros tiu ĉi maŝino mem.

-Jen -(...)- rigardu ĉi tiun nerveron. Nia aĉa kaj perfida najbaro, Heronio, pretigas atakon kontraŭ ni, sed la gvidmaŝino,...

En tju ĉi momento el la maŝino saltis blindiga fulmo, rekte en la etenditan brakon de la ministroprezidanto kaj mortfrapis lin. (...).▲

Ĉi ĉio kompreneble okazas, post ol la ministroprezidanto ekpremis la funkciigan butonon.

Kiel hazarde! Plagiato eble? Vi juĝu.

Nu, F. B. aperigis sian "Respondo" en 1954. La novelaro "Maŝinmondo" de S. S. estis finpresita en julio, 1964. En la epilogo "Mia vivo kaj verkado" S. S. nomas ĝin "la nuna titolnovelo". Krome, Vilĉjo Oldo diras en la enkonduko, ke "la 'Vojaĝo al Kazohinio' estas kompreneble la unua volumo en Esperanto de Szathmári", kaj ĉi tiu verko ne povis aperi en E-o ĝis 1958. Eĉ pli: en la novelo mem oni diras, ke la verkon oni skribis en 1963.

Ĉiaokaze, malgraŭ ebla "prunto", "Maŝinmondo" ne estas nur tiuj linioj, sed verko multe pli ampleksa kaj riĉa, tute diferenca de la braŭna rakonto.

Post ĉio antaŭa, ĝis! (Unu, du, tri, kvar, finita la far'!²).

PRI JUSA kONGRESO.

Preskaŭ ducent dudek personojn gastigis la 44a Hispana Esperanto-kongreso okazigita kiel sciite en la urbo Seviljo dum la pasinta julio. Mi ne povas juĝi, ĉu ĝi estis sukcesa aŭ ne, tio estas via afero. Tamen, mi ja povas esprimi kelkajn konsiderojn rilate ĝin. Mi ne volas rakonti al vi ĝian tutan disvolvigon, ĉar tion vi certe trovos en aliaj informaj publikajoj. Do, mi mallonge parolos pri tio, kion vi ne trovos en tiaj revuoj, ĉar mi ne volas esti hipokrita kaj mi timas nenion.

Konstatebla estas la malmultenombra ĉeesto al oficialaj programeroj (ĉu eble pli ol kvindek personoj ĉeestis iun oficialan kunsidon, prelegon aŭ ion ajn?). Multegaj personoj akompanis la folkloran prezentadon (tre bone kantis kaj dancis la muzikensemblo de Maruja Gutiérrez). Ankoraŭfoje videblas, ke la plejmulto el la kongresanoj profitas la kongreson precipe por turismi. Eĉ la kongrestemo temis pri tio (rememoru, ke oni devis elteni tedegan hispanlingvan prelegon pri tio, kaj almenaŭ sep eksterlandanoj sin demandis, pro kio ili venis en hispanan kongreson).

Pli interesaj estis la neoficialaj programeroj. Kadre de "Sciencaj Horoj", tiel vigle kaj trafe aranĝitaj de s-ano Alonso Núñez, okazis preskaŭ dudeko da prelegoj sekvitaj de interesaj debatoj. Feliĉe, en la kongresaj konkludoj oni oficialigis tiujn sciencajn horojn.

Pli neeltenebla estis la ĉagreniĝo de nia kara prezidantino la ekskursan tagon kontraŭ L.K.K. Fine estis ni, kiuj devis pagi por tio, ke ŝi ne povis lasi "la mortinton" (tio estas, la Federacion) al alia. Krom tiu nesurprizaĵo, oni ne vidis aliajn interesajn aferojn dumkongrese. Finfine oni ne parolis pri tio, kion oni devis. Kiel mi antaŭvidis, la kongreso estiĝis hipokrita, kaj ne mankis kritikoj kontraŭ L.K.K. fare de kelkaj kongresanoj (ekzemple ni kulpis pro tio, ke ne estis leterkestoj proksime de la kongresejo, ke la muzeoj estis fermitaj posttagmeze, ktp.), sed por solvi tion oni aranĝis la aferon manĝigante ilin. Post tio la kongresanoj ĉiam sin montris tute

feliĉaj kaj gajaj.

Sajne, dum la kongresa historio en Hispanio, ĉiam oni dorlotis la kongresanojn per senpagaj programeroj, kaj, kiam oni pagigas ilin (kutimo en internaciaj kongresoj), ili ĝeniĝas.

Fine, mi diru, ke al Sevilo, la kongreso ne lasis fruktodonajn konsekvencojn. Se la movado en Sevilo ne malaperos post kelke da tempo, tio ŝuldiĝos al la "mano de Dio". Post ĉi kongreso, mi estas tute elreviĝinta. Eble, tion ĉiam oni sentas post niaj kongresoj. Mi vidas la solvon al ĉio tre lontana. Kaj vi?

Alberto Franco Ramírez

➔ **PRI ĴUSA TENDARO (Logrono; Paskon, 1982).**

LA FARĈA FOTO ↵



Fotoj faritaj de E-spiritistoj

Fotis Medi U.M. ; Titolo: "LA INTERNA IDEO "

